# *Dua rondo de dialogo en Washington inter Kubo kaj Usono.*



Delegitaroj de Kubo kaj Usono efektivigos ?i-27-an de februaro, la duan rondon de dialogoj celantaj restarigi la diplomatiajn ligojn inter amba? landoj, pri kio ili anta?sciigis sintenojn kaj fokuson konstruan.

La dialogo sekvas la anta?ajn, okazintaj la 22-an de januaro en Havano, kaj denove estos gvidataj de la ?enerala direktorino pri Usono de la insula miniterio pri eksteraj rilatoj, Josefina Vidal, kaj la asista sekretario de Usono por aferoj de la okcidenta hemisfero, Roberta Jacobson.

Vidal jam estas en Washington kun alia grupo de funkciuloj por plenumi intensan  laboragendon.

Ili jam esprimis la volon avanci al restarigo de interrompitaj ligoj kaj la malfermo de ambasadejoj, kiel estis anoncite  de la kocernaj prezidentoj Raúl Castro kaj Barack Obama, la 17-an de decembro.

La? sciigis la vicdirektoro ?enerala pri Usono de la kuba ministerio pri eksteraj rilatoj, Gustavo  Machín,  Kubo ?eestas la kunsidon kun konstrua spirito.

La diplomato menciis la problemojn alfrontatajn de la sekcio de interesoj de Kubo en Washington pro la manko de alirebleco al usona banko kaj esprimis ke la insulo planas prezenti projekton por la diskuto pri la temo de la homaj rajtoj.

Li sciigis ke dum la dialogo oni insistos pri la graveco restarigi la diplomatiajn ligojn sur solidaj bazoj, surbaze de reciproka respekto, ne enmiksi?o en la internajn aferojn kaj la suverena  egaleco de ?iuj landoj, principoj establitaj en la ?arto de UN.

Funkciulo de la usona ?tatdepartemento, kies nomo kaj posteno ne estis precizigitaj, klarigis dum telefona konferenco  la volon kiel eble plej rapide restarigi la rilatojn.

Pri la temo de la ekskludo de Kubo el la listo de subtenantoj de terorismo, li klarigis ke Washington vidas tion kiel aparta afero, li aldonis ke “evidente oni avancas en la reviziado de la temo kaj esperas ?in solvi rapide, sed amba? aferoj ne devas esti ligitaj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/47776-dua-rondo-de-dialogo-en-washington-inter-kubo-kaj-usono

**Radio Habana Cuba**